

ILEI raportas

2015-07-15

Raportas la prezidanto pri trimonata agado de 2015-04-15 ĝis 2015-07-15

Revuoj: kiam eraro alportas pozitivajn sekvojn

La revuo Juna Amiko iris erare al la kutimaj ricevantoj de IPR... Tamen la ILEI membroj, kiuj ne konas JA-n, povos malkovri ĝin kaj eble aboni. Ni devis reprinti stokon por sendi JA-n al la abonantoj. Temas pri ne planita varbagado.

TTK: Tria Tutmonda Kolokvo

Pri ĝi aperos artikolo en IPR 2015 3. Negative estis, ke diplomatoj ne venis krom unu. Lokaj fakuloj tute ne venis. Do ni estis inter ni. Sed pozitive estis, ke nia grupo konsistis el elstaraj prelegantoj kaj tiu tritaga laboro alportis informojn kaj stimulojn. Tiu Kolokvo spronis la intereson pri Eo en la regiono de Neuchâtel La Chaux-de-Fonds, tion ni jam nun povas konstati. Okaze de tiu evento ILEI povis profiti la kunlaboron de Sinjorino Sonia Risso el Urugvajo.

Mirejo Grosjean nun kolektas nun la prelegojn por aperigi Memorlibron pri tiu evento. Nelida Weidmann filmis ĉion. Sonregistradon faris Zlatko Tišljar.

48a Konferenco 2015 en Belgio

Ĝi okazos de la 17-a ĝis la 25-a de julio en **Oostende**, Belgio, antaŭ la centa UK en Lille, Francio. Preparlaboroj okazas fare de sespersona tre efika skipo.

La estrarano pri konferencoj Radojica Petrovic kaj la prezidanto preparis pli ol 40 invitleterojn por ekstereŭropaj partoprenantoj.

IT = Instruista Trejnado. Okazos diversaj prelegoj kaj praktikaj aktivadoj pri IT dum la Konferenco. La partoprenantoj ricevos atestilon.

Ŝajnas, ke proks 150 personoj partoprenos. Do temos pri rekordo en la historio de ILEI.

La urbestro de Oostende anoncas sian partoprenon dum la malfermo en la urbodomo.

Simpozio okazos kun kontribuo de ekstermovadaj prelegantoj. Kristin Tytgat zorgas pri tiu evento kaj sukcesis arigi altnivelajn prelegantojn.

Okaze de tiu evento ILEI povos profiti la kunlaboron de Sinjorino Sonia Risso el Urugvajo.

UK Lille

Ekzamensio por blinduloj estas anoncitaj kadre de UK, organizita de ILEI. Ĝi estas sistemo de ILEI. Regularo legiĝas sur la retpaĝo www.ilei.info.

ILEI havos budon dum UK. ILEI aperos kadre de la Movada Foiro.

ILEI printis informilojn por UK kongresaj sakoj. La kongresanoj malkovros la agadon de la Ligo kaj eble membriĝos.

ILEI zorgos pri la Tago de Lernado prezentante diversajn prelegojn pri pedagogio. Preparlaboroj estas survoje, sub la gvidado de Marija Belosevic. Okaze de tiu evento ILEI povos profiti la kunlaboron de Sinjorino Sonia Risso el Urugvajo.

Venontaj Konferencoj

Nyíregyháza (HU) gastigos nian 49an Konferencon en 2016 post UK en Nitra (SK). En **Bjelovar** okazos poste la unua ILEI-festivalo de Esperantaj kulturo kaj pedagogio. Preparlaboroj okupas jam nun nian estraranon pri Konferencoj Radojica Petrovic, ĉar ni volas informi kaj varbi jam en Oostende kaj Lille.

Vivo de la Ligo

Kvin landoj kontentigas la kondiĉojn por **fondi sekcion**. Tamen neniu oficiala kandidatiĝo atingis la prezidanton antaŭ la Konferenco.

Membroprizorgadon prizorgas Sebastian Cyprych (Pollando)

La prezidanto sendis **salutmesaĝon** al SES en Martin, Slovakio.

Elekta Komisiono La nova Elekta Komisiono konsistas el Aurora Bute, Monique Arnaud kaj Synnöve Myttinen. Ili laboras por krei novan efikan estraron por la mandato 2015-2018. Mireille Grosjean starigis detalan liston de la farendaj taskoj kadre de la estraro. Temas pri dokumento kun 22 punktoj.

En tiu ĉi jaro 2015 ankaŭ la Internacia Ekzamena Komisiono estos elektita kaj aprobita de la Komitatoj de ILEI kaj de UEA. La prezidanto de IEK Karine Arakeljan kaj la prezidanto de ILEI kunlaboris por proponi taŭgan liston.

Kontaktoj kun movadaj asocioj

La prezidanto arde kunlaboras kun UEA kaj TEJO por venigi afrikajn junulojn al la eŭropaj eventoj. Abundas retmesaĝoj kaj informfluo. Ĉu tio gvidos al sukceso? Ni vidos.

Ni planas la datojn de niaj eventoj kune kun UEA, TEJO kaj SES (Somera Esperanto Studado) por eviti koliziojn.

Kontakto kun ekstermovadaj institucioj

Ne okazis pro la abunda interna laboro

Agadoj

Premio La Torre Unu persono kandidatiĝis. Ĵurio laboris. Decido okazis. La anonco diskoniĝos okaze de la Konferenco en Oostende.

Subteno el Urugvajo La estraro de ILEI decidis kontribui al la alveno de Sinjorino Sonia Risso el Montevideo (kune kun la bretona federacio), kiu brile organizis nian Konferencon en 2014. Ŝi alvenis al Svislando jam la 10an de majo kaj helpis dum la TTK tre efike. Por la Konferenco kaj UK ŝi plu subtenos nin.

El Argentino venas bezono lertigi geinstruistojn. Venis konkretaj kaj interesaj proponoj. Tio stimulas nin. Ni devos prilabori tion. Espereble ni havos tie efikajn kunlaborantojn.

Farendaĵoj; sama komento kiel en la aprila raporto

Mastrumi paralele la ĉiutagajn taskojn, la organizon de la Tutmonda Kolokvo, la organizon de nia ĉiujara Konferenco, la esplorojn pri la venontaj eventoj, la aperigon de du revuoj, tio komplete eluzas la energion kaj tempon de la aktivaj estraranoj. Diversaj ideoj kaj projektoj estas en atendo.

Atendas Interkulturo, eldona agado, ligo al Unesko, instruista trejnado kaj diplomigo, universitata agado, renovigo de la retejo www.ilei-mondo.info, kunlaboro kun ISAE... Fakte ni ne povas bone plani nun, sen koni la konsiston de la nova estraro. Espereble naskiĝos agema estraro en Oostende, ILEI bezonas tion!!

2015-07-15 Les Brenets, CH

Mireille Grosjean

Prez. de ILEI